# EKO 2025

**Sciigoj sen troigoj**

EKO 2025-18. Aprilo 30. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: Sume 300 KB

## Infana Kongreso en Brno

Ni atendas ĉirkaŭ 40 infanojn kaj adoleskantojn, kiuj parolas Esperanton (minumume – scipovas baze kaj klare esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto): infanoj kaj adoleskantoj ĝis 15-jaraj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj. Adoleskantoj kaj fluparolantoj povas fariĝi helpantoj. Infanoj ĝis sep jaroj kutime bezonas gepatron/ prizorganton/vartiston dum IIK. Pliaj informoj en la retejo [https://iik.uea.org/2025 5](https://iik.uea.org/2025)

Fonto: RE majo, p. 111

## Kleriga lundo en Brno

En la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Brno, Ĉeĥio, denove okazos la populara programo [Kleriga Lundo](), la 28-an de julio. La Kleriga Lundo celas ne nur informi kongresanojn pri diversaj temoj, sed ankaŭ doni al ili okazon praktiki kaj vivsperti pri la traktataj temoj. Pro tio la programo kutime ligiĝas al interagaj sesioj kaj al metiejoj. La diversajn aktivaĵojn, kiuj konsistigas la Klerigan Lundon, povas gvidi ĉiuj homoj el la Eo-komunumo pretaj dividi spertojn kaj sciojn, tiel ke speciala celo de tiu programero ankaŭ estas krei ligon inter esperantistoj per sciodivido kaj kunvivado. Se vi interesiĝas kaj volas ion proponi, plenigu la [formularon]() "Proponu programeron", ankaŭ troveblan en la retejo de la UK ([https://uk.esperanto.net)](https://uk.esperanto.net) ĝis la **30-a de aprilo 2025**.

Fonto: Gazetara Komuniko de UEA

***SMG:*** Ĝis aprilo 30 al la UK aliĝis 960 personoj el 61 landoj: Elstare: Ĉeĥio 111, Germanio 106, Pollando 96 kaj Francio 76. UEA survojas al mil kongresanoj!

## Itala Kongreso aŭguste - bonguste

Ĉu vi partoprenos en **la 91-a itala kongreso de Esperanto** de SALSOMAGGIORE TERME? Jen: **[kongreso.esperanto.it/91](https://kongreso.esperanto.it/91)**




Faru tuj, ĉar kursoj, prelegoj, koncertoj kaj multe da aliaj programeroj kaj seminarioj atendas vin. Ni havos du gravegajn instruistinojn por la kursoj pri lingvo: **Zsófia Kóródy** kaj **KRISTIN TYTGAT.** Ne mankos muziko kun **ĴOMART KAJ NATASHA, LUCIO AVITABILE, CLARISSA SABATINI, JOMO kaj....**

Ni prezentas programon de ekskursoj organizitaj por vi dum la  semajno de la kongreso por ebligi al vi koni la plej karakterizajn lokojn, kiuj kunekzistas en la

Pada Ebenaĵo. Ni iros de vilaĝoj al mezepokaj kasteloj, ni renovigos la rilaton kun la naturo, ni trapasos la naskiĝlokon de Giuseppe Verdi ĝis alveno al la hodiaŭaj urboj. Eblas rezervi ekskursojn el la riĉa programo. Ĉe la retpaĝo https://kongreso.esperanto.it/91/ekskursoj/ vi trovos informojn por aliĝi kaj ĝuj fotojn.

## Varie kaj Tut-Amerike




VARIE estas nova virtuala evento, kiu okazos ĉiun duan monaton. Ni esperas pliigi interkomprenon inter Esperantistoj el norda, centra, kaj suda Ameriko. En la unua VARIE, ni aŭskultos paroladojn pri la Esperanto-movado en multaj landoj de la Amerikoj, kun muzika paŭzo de Jordan Zero, profesia muzikisto el Kanado. Ĉiuj estas bonvenaj. Uzu ĉi tiun ligilon:

https://us02web.zoom.us/j/4429325471?pwd=aHVrRDBFdkJEeGRqY2FNQjdwNmgwQT09

***SMG:*** Temas pri la virtuala plusekvo de la kunsidoj TAKE (Tut-Amerika Eo-Kongresoj.

Sendis: Guy Matte, Kanado

## Gratuloj al Hispanio

Aperis la centa bitbulteno de la Hispana Landa Asocio HEF. Konforme al la celoj de Hispana Esperanto-Federacio, pluraj agadoj de la Hispana Kongreso estos malfermaj al la ĝenerala publiko de Sorio, inkluzive de ekspozicio pri Esperanto.


## Facilaj angiloj

Aperis nova kaj interesa artikolo en la retejon <uea.facila>, kiun prizorgas Anna Löwenstein. La artikolon verkis Carolyn Thomas-Nedzelsky kun la titolo Angiloj:

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/angiloj-r472/

Pri la retejo ni legas en ĝia bonveniga paĝo: "La artikoloj estas mallongaj kaj facilaj por helpi homojn, kiuj nun lernas la lingvon, kaj ili enhavas nur la radikojn troveblajn en la listo de facilaj vortoj (https://uea.facila.org/vortlisto/)."

Ahmad Mamduhi, ILEI-prezidanto. https://www.ilei.info/




## Kantoj subtenindaj en *Spotify*

Jen raporto pri Eo-kantoj kun malpli ol mil alrigardoj. Pli da spektantoj dezirataj!

https://open.spotify.com/playlist/6EZRgDnIS18UI5HAgIbmbX?si=cbe343e1cc8f41b7&nd=1&dlsi=78434ab5cb7448e8

Tradukita de SMG el kompilo de Laszlo Szilvási, Hungario

## La Tago de Eŭropo eluzinda

Alproksimiĝas la 9-a de majo kaj la eŭropaj esperantistoj ekpretiĝas por la evento. La **9-a de majo** estas la **Tago de Eŭropo**, kaj reprezentas por ni la plej favoran momenton por sinprezenti al la ekstera publiko per ago kaj *interna* kaj *ekstera*.

Kion mi celas? Eŭropa Unio decidis en la jaro 1985 adopti oficiale la **finan movimenton de la 9-a simfonio de Ludwig van Beethoven 'Odo al la ĝojo'** (inspirita de la teksto *An die Freude* [Al la ĝojo], verkita en la germana lingvo de Friedrich Schiller) kiel himnon de Eŭropa Unio (kaj de Konsilio de Eŭropo, ekde 1972). Ĝi ne havas oficialan tekston, por eviti lingvajn problemojn. Tamen, **Eŭropa Esperanto-Unio** proponis tekston en Esperanto, verkitan de la antaŭa prezidanto de EEU **Umberto Broccatelli**, italo kaj forta subtenanto de eŭropa federaciismo.

Luiĝi Fraccatoli, sekretario de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)

## Brazilaj ritmoj



Antaŭ pli ol 500 jaroj unuafoje la eŭropanoj alvenis tien ĉi kaj malkovris belan teron, plenan je indiĝenaj civilizacioj. Ekde tiam la 22-a de aprilo fariĝis konata de la alvenintoj kiel 'tago de la malkovro'. **James Piton** faris belan tradukon de sambo verkita de **Ary Barroso** omaĝe al Brazilo, nome [Tio ĉi, kio estas ĝi?](). Ĝia originala titolo estas *Isto aqui, o que é?*:

## Novaĵoj Tamtamas el Japanio

Korea esperantistino Tamara vizitis Japanion kaj Eo-muzeon sub prizorgo de la familio Kitagawa (***SMG***: signifo: 'Norda rivero'. Hisashi Kitagawa estis mia kolego en la CO en Roterdamo antaŭ ege multaj lunoj).

## Diplomatoj diskutotaj en Vilno

Nijolė Žambaitė, Litovia ekonomo, diplomatino kaj prezidanto de la Vilna Esperanto-Societo, prelegos pri 'Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj' en BET-59 en la universitato Vytautas la Granda (Kaŭno, Litovio). Vidu ĉe https://sezonoj.ru/2025/04/bet-190/.

========= vortoj: 760, kaj ene de tri paĝoj! =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dek tri numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.